

Andrzej Pettyn

ESPERANTO EN EPIZODOJ

(paroligaj ekzercoj por kursoj kaj studrondoj)



Oy MENDOSERVO Ak
Hyvinkää - Finnlando - 1992

Oy Mendoservo Ak rekomendas

lernilojn

		Paĝoj
Ĉu vi parolas Esperante? Internacia lernolibro	Pettyn	72
Sonkasedoj C60 2 ekz. por "Ĉu vi parolas..."	Pettyn	
Gramatika ekzercaro de Esperanto	Bieliński	48
Gramatiko por ĉiu	Bieliński	
Oportuna vortaro de ordinara Esperanto	Setälä	96
Privilegia vojo ..., Internacia lernolibro	Setälä	128
Taglibro de kongresano, Legolibreto	Setälä	24

literaturon

Adolesko, Romano	Vaha	248
Dum vi estis kun ni, Romano	Nemere	165
La finna vojo, Politikaj rememoroj	Kekkonen	109
Interparolo en la frukt-ĝardeno la 5-an de aŭgusto	Newerly	67
Penetre tra jarcentoj, Diraĵoj, anekdotoj kaj ŝercaĵoj	Szczurek	68
Sep fratoj, Romano	Kivi	360
Silka kuseno, Novelaro	Rosbach	63
Transe, Romano	Lorjak	153
Venĝanto, Historia romano	Bornhöhe	118

ceteron

Gastlibro, Lede tegita metiarta ĵo
Kiam Parizo estis Parizo..., VHS/PAL videokasedo de Nikolin
Kukerpillid, Alternative VHS aŭ BETA/PAL videokasedo kun popolmuziko
Inkluzive unu kanton en Esperanto

Plie

Multajn aliajn titolojn, el kiuj parto elĉerpiĝos post nelonge.

Mendu la kompletan validan prezaron rekte el la eldonejo:

Oy Mendoservo Ak

Kivistöntie

SF-05510 Hyvinkää

Finnlando

Andrzej Pettyn

ESPERANTO EN EPIZODOJ

paroligaj ekzercoj

Oy MENDOSERVO Ak

La ekzercokajero **Esperanto en epizodoj** realiĝis kadre de la someraj Esperanto-kursoj en la Popola Altlernejo en Karlskoga (Svedio 1990).

La kopirajto ĉe la aŭtoro kaj ĉe Oy MENDOSERVO Ak.

Kompostita kaj enpaĝigita de Kaisa Hansen (Svedio).

La libron eldonis kaj distribuas:
Oy MENDOSERVO Ak
Kivistöntie
SF-05510 Hyvinkää
Finnlando

ISBN 951-96076-9-2

Enkonduko

La nuna ekzercaro celas paroligi homojn, kiuj lernas Esperanton, per mallongaj epizodoj-dialogoj, en kiuj troviĝas kliŝaj frazomodeloj kun substitueblaj (ŝanĝeblaj elementoj). La ekzercaron oni povas uzi kun laŭplaĉe elektita lernolibro aŭ sen lernolibro. Ĝi taŭgas same por studrondoj, kiel ankaŭ por memlernantoj, kiuj iam lernis la lingvon, delonge ne uzas ĝin en parola formo kaj dezirus laŭeble rapide reakiri la parolkapablon. Kompreneble, la ekzercaro estas bone uzebla en ordinaraĵ kursoj kiel bazo por konversaciado kombinebla kun plej diversaj lernolibroj, en kiuj abundas gramatikaj klarigoj, priskribaj tekstoj, sed ofte mankas specimenoj de ĉiutagaĵ konversacioj.

Per la ekzercaro oni ebligas al la kursanoj naturan interparoladon, ili interparolas unu kun la alia, la kursgvidanto ne foruzas la tempon por starigado de demandoj, ĉar la kursanoj mem faras tiajn laŭ la modeloj. Ŝanĝiĝas la rolo de kursgvidanto, kiu malpli aktoras, sed ĉefe "reĝisoras" la interparolojn laŭ la scenaroj (epizodoj-dialogoj), kiuj enestas en ĉi tiu libro. Tio ankaŭ iom post iom forigas la kutiman timemon kaj naturvoje kuraĝigas la gelernantojn paroli flue kaj elegante. La gelernantoj de la komenco scias, ke ili parolas **korekte**, ĉar ili facile ŝanĝas la indikitajn elementojn kaj de la komenco ili scias, kiujn ŝanĝi por ne erari. Ĉio ĉi naskas memkontenton kaj eĉ fieron, ke "oni kapablas", kaj plifirmigas la pozitivajn lernomotivojn. Aparte grava estas tio, ke de la komenco la kursanoj esprimas en la dialogoj deziron, volon, intencon, planon aŭ emon, kio kreas emocian ligitcon kun la ekzercomaterialo. Ekde la komenco oni interparolas, malaperas do la antaŭjuĝoj pri "artefariteco" de E-o. Ekde la komenco oni komunikas ion al siaj partneroj, do oni tuj vidas la komunikan valoron de la lingvo.

Kiel oni uzu la dialogojn?

1 La kursgvidanto prezentas laŭvican dialogon, klarigas la gramatikaĵojn, laŭbezone kelkajn vortojn; aparte oni prezentas la frazomodelojn, kiuj troviĝas en la koncerna dialogo, oni kreas diversajn variantojn de modela frazo, ŝanĝante la indikitajn elementojn; oni atentigu la gelernantojn, ke en dialogo-modelo aŭ frazo-modelo samkategoriajn aŭ samklasajn vortojn oni rajtas anstataŭigi per aliaj je la sama gramatika valoro, do ekz. substantivon en singularo oni anstataŭigu per alia substantivo en singularo, adjektivon en pluralo oni anstataŭigu per alia adjektivo en pluralo, ktp.

2 Komenciĝas la praktika ekzercado de la dialogo-modelo:

2.1

La kursgvidanto laŭvoĉe eldiras unu frazomodelon, ekz.

A: Kien vi **iras**?

kaj ĉiuj tuj pli poste laŭvoĉe (ĉiuj kunel!) ripetas:

A: Kien vi **iras**?

La kursgvidanto ŝanĝas la frazon (lomete) kaj diras:

A: Kien vi **kuras**? (ĉiuj laŭvoĉe ripetas)

La kursgvidanto eldiras laŭvoĉe la respondon:

B: Al **apoteko**. (ĉiuj laŭvoĉe ripetas)

La kursgvidanto eldiras kelkajn aliajn variantojn, ekz.

B: Al **kinejo**. (ĉiuj laŭvoĉe ripetas)

B: Al **hospitalo**. (ĉiuj laŭvoĉe ripetas)

Atenton!

Tia laŭvoĉa ripeto de kelkaj variantoj de la koncerna dialogo estas tre grava, ĉar la gelernantoj per tiaj komunaj laŭvoĉaj eldiroj akiras pli da kuraĝo, krome per tiaj eldiroj plifirmiĝas en la memoro la lernataj frazomodeloj kune kun la ŝanĝeblaj elementoj.

2.2

Sekvas individuaj interparoloj en duopoj, ekz. lernanto **A** metas demandon al **B**, **B** respondas, finiĝas la dialogo, kaj poste **B** metas demandon al **C** ktp. Iom post iom interparolas ĉiuj laŭvice konstante uzante la saman modelon.

Atenton!

Oni povas diversmaniere variigi la interparolojn, ekz. post la interparolo de **A** kaj **B**, **B** povas mem elekti partneron laŭ sia plaĉo, ekz. **F** (sekvas interparolo laŭ la sama modelo) kaj poste **F** elektas alian partneron, ekz. **D** aŭ denove **A** (se estas permesite elekti personon, kiu jam interparolis, oni mem decidu tion). Laŭvicajn parojn de interparolantoj povas indiki la instruisto. Aŭ, oni povas interkonsenti, ke ekz. virinoj metas demandojn al viroj, aŭ inverse.

Tre interesa ebleco kreiĝas jam meze de la kurso, kiam oni jam trastudis la ĉapitron de "k-demandoj". Tiam post la finiĝo de la baza dialogo, kiam interparolas ekz. **A** kun **B** ĉiu povas meti kroman demandon al **B**, sed la demando devas ligiĝi kun la lasta respondo de **B**, ekz.

A: Kion vi intencas fari hodiaŭ vespere?

B: Mi intencas danci.

Finiĝis la baza dialogo kaj ĉiuj povas demandi, ekz.

H: Kun kiu?

B: Kun mia amiko

J: Kie vi intencas danci?

B: En la kafejo "La verda koboldo".

C: Kiom ofte vi vizitas ĉi tiun kafejon?

B: Ĉiun duan semajnon.

Z: Ĉu ĉiam kun via amiko?

B: Tio estas sekreto! ktp.

La gelernantoj eĉ ne rimarkas, kiam post kelkaj tiaj ekzercoj, ili komencas paroli tute flue, spontane kaj samtempe ili bone amuziĝas, ĉar plej ofte oni faras strangajn, surprizajn demandojn. La kurso fariĝas ludo! Multe pli da metodikaj konsiloj pri la praktika aplikado de ĉi-specaj ekzercoformoj oni trovas en mia libro "Esperanto en dialogoj" (Varsovio, 1990).

Ĉar E-o ofte funkcias kiel pontolingvo, estas rekomendinde ekzerci la interpretadon. Ekz. ĉe la dialogo 19 la kursgvidanto povas peti nacilingve "Demandu lin, kiam li volas iri al kinejo?" La petita persono demandas, sed jam en E-o: "Kiam vi volas iri al kinejo?" La demandita persono respondas en E-o: "Postmorgaŭ vespere." La kursgvidanto demandas nacilingve "Kion li respondis?" Sekvas la interpreto nacilingven. ktp.

La parol-ekzercojn oni povas tute bele ligi kun skribaj ekzercoj. La kursgvidanto povas ekz. doni hejmtaskon, ke oni skribu daŭrigon de ekz. dialogo 19 aŭ de alia dialogo (oni menciuj la numeron). Oni povas (eĉ oni devas) fiksi la limon, ekzemple: skribu la daŭrigon per maksimume 4-6 demandoj kaj respondoj.

En la plejmulto de la dialogoj gravan rolon ludas prepozicioj, do ĉe la enkonduko de laŭvica ĉapitro aperas la ebleco iom priparoli la prepozicion, kiu ĉefrolas tie.

Grava ekzerco, tre rekomendinda, estas "rakontado de dialogoj". Kiam finiĝas laŭvica interparolo, ekz. de A kun B la kursgvidanto povas demandi, kiu el vi rakontos pri kio ili interparolis? Ekz.

A: Kion vi intencas fari semajnfine?

B: Mi intencas ekskursi al Berlino.

A: Kun kiu?

B: Kun Georgo.

Rakonto: (la devo de la kursano estas prezenti, "rakonti" la enhavon de la dialogo): Semajnfine Barbara intencas ekskursi. Ŝi intencas ekskursi al Berlino kun Georgo. ktp.

Alia grava ekzerco, precipe rekomendinda ĉe ripetado, estas interparoloj laŭ difinita skemo, sed per la utiligo de "signal-vortoj". Ekz. la baza demando estas "Kion vi intencas fari **hodiaŭ vespere?** (hodiaŭ posttagmeze ktp.) Unu el la kursanoj metas la demandon al sia kolego. Tiam la kursgvidanto eldiras "signal-vorton", ekz. "renkontiĝi kun Eva!" (La signalo povas esti eĉ kelkvorta, ĝi simple celas "suflori" la respondon). Kaj la kursano devas sekvi ĉi tiun suffloron kaj ekz. diri: "Mi intencas renkontiĝi kun Eva".



La konversaciadon laŭ "Esperanto en epizodoj" karakterizu serena, neformaleca atmosfero. Dum la tuta tempo oni procedu tiel, ke la gelernantoj havu la senton de sukceso kaj antaŭeniro, ili konsciis ke la kabineta krea ĵo de Zamenhof mirinde funkcias en la praktiko kaj donas multe da ĝuo al tiuj, kiuj lerte kaj plenkapable povas uzi la lingvon. Sukceson!



Finante mi volas tutkore danki al ĉiuj, kiuj kontribuis al la aperigo de ĉi tiu ekzercaro. Tute aparte mi dankas al gesinjoroj Kaisa kaj Ole Hansen el Upplands Väsby (Svedio), kiuj donis al mi multajn tre valorajn lingvajn kaj teknikajn konsilojn.

Andrzej Pettyn

Bazaj demandomodeloj

Al la plej oftaj demando-frazoj apartenas "tutecaj demandoj", kiujn enkondukas la vorto "ĉu". Ili demandas pri la tuta enhavo de la frazo kaj al tiaj demandoj oni respondas per **jes, ne, tute ne, absolute ne, neniel, neniom** ktp. Ekz.

A: Ĉu vi intencas iri al **teatro**? (kafejo, operejo, muzeo)

B: **Jes**, mi intencas. (**Ne**, mi ne intencas.)

Kelkfoje la demandon oni esprimas per tono, frazoakcento, ekz.

A: Mi intencas **iri al teatro**.

operejo

aĉeti aŭtomobilon

televidilon

videoaparaton

B: **Morgaŭ?**

Lunde posttagmeze

A: Jes, ĝuste.

Kelkfoje oni demandas per la uzo de indiko kaj oni postmetas la demandan vorton **ĉu** ĉe la frazofino kune kun **ne**, ekz.

A: Vi intencas iri al **teatro, ĉu ne?**

poŝtoficejo, **ĉu ne**

vardomo, **ĉu ne**

B: Jes, mi intencas.

(b: Bedaŭrinde, mi ne intencas.)

En la supre menciita okazo oni povas ankaŭ uzi "**ĉu ne vere?**" aŭ (eble malpli ofte) "**ĉu vere?**".

Estas substrekinde, ke en E-o ne estas deviga la uzo de "ĉu?" en la postmeto ĉe la neaj indikaj frazoj, ekz.

A: Vi **ne** intencas iri al teatro, **ĉu?**

En E-o oni povas uzi en ambaŭ kazoj "**ĉu ne?**"

A: Vi **ne** intencas iri al teatro, **ĉu ne?**

Tamen kiam oni respondas jese al la nea demando oni uzas "Jes, ja!"

A: Vi **ne** intencas iri al teatro, **ĉu?** (ĉu ne?)

B: **Jes ja!** Mi intencas.

En E-o ekzistas **Ĉu-demandoj** diversstrukturaj kaj ne eblas priparoli ilin ĉiujn. Sed ni almenaŭ menciuj kelkajn bazajn aŭ plej oftajn, ekz.

Ĉu -o -as?

A: **Ĉu Karlo promenas?** (kantas?)

B: Jes, li promenas. (kantas).

(Ne, li ne promenas./Ne, li ne kantas.)

Ĉu -o -as -o?

A: **Ĉu Roberto estas instruisto?**
oficisto?

Ĉu -o -as -a -o?

A: **Ĉu Stefano estas bona instruisto?**

Ĉu -o -e -as?

A: **Ĉu Andreo bone instruas?**

Ĉu -o -as -i?

A: **Ĉu Petro ŝatas kanti?**

Ĉu -o -as -e -i?

A: **Ĉu Georgo ŝatas longe promeni?**

Ĉu -o -as -i P -o?

A: **Ĉu Karlo ŝatas promeni en parko?**

Atentoni!

Per la litero "P" mi signis prepoziciojn, en la supre menciita kazo estas "en", sed oni povas ankaŭ uzi aliajn prepoziciojn, ekz. "per":

Ĉu Karlo ŝatas veturi per aŭtomobilo?
trajno, trotilo

Ĉu -o -as -on?

A: **Ĉu Georgo legas libron?**
gazeton

Ĉu -o -as -an -on?

A: **Ĉu Georgo legas interesan libron?**
vesperan gazeton

Ĉu -o -as -ojn?

A: **Ĉu Georgo ŝatas librojn?**
videofilmojn

Ĉu -o -as -ajn -ojn?

A: **Ĉu Georgo ŝatas historiajn librojn?**
komediajn filmojn

Similajn frazostukturojn oni povas formuli en pluralo, ekz.

A: **Ĉu** ni helpu vin en **via laboro**?

la lernado de Esperanto

la riparado de via aŭtomobilo

B: Jes, mi petas.

Jes, mi estos tre dankema al vi.

La **Ĉu**-demandoj aperas ankaŭ en frazoj kun kunmetitaj verboformoj, ekz.

A: **Ĉu** via domo jam estas **konstruita**?

renovigita

riparita

Tute aparta speco de demandofrazoj estas la t.n. (tiel nomataj) **alternativaj demandoj**, ekz.

A: **Ĉu** vi preferas lerni **aŭ** promeni?

A: **Ĉu** Barbara intencas bicikli **aŭ** piediri?

Atentoni!

Karakteriza trajto de la alternativaj demandoj estas la vorto "ĉu" en la komenco kaj "aŭ" en la mezo de la frazo.

K-demandoj (demandpronomoj)

Sufiĉe granda parto de la demandofrazoj komenciĝas per demandpronomoj (interrogativoj). Ĉi tiuj pronomoj komenciĝas per la litero "k", ekz. **kiu, kio, kia, kiam**, ktp. kaj ili servas al la kreado de la t. n. "partecaj demandoj", per kiuj oni demandas pri unu vorto (oni respondas per la pridemandita vorto aŭ per subordita frazo), ekz.

A: Kien vi **iras**?

kuras

B: Hejmen.

A: Kial vi estas **kolera**?

malgaja

B: Tial, ke mi perdis mian **pasporton**.

monujon

La ofteco de la uzado de demandpronomoj laŭ la analizo de la intervjuoj faritaj de mi por la E-elsendoj de Radio Polonia en 1983 (la dua jaruono) prezentiĝas jene (en krampoj mi mencias la oftecon laŭ la zagreba frekvenc-listo:)

Ofteco	Demandvorto	E-elsendoj	Zagreba listo
1	kiu	28,0%	35,33%
2	kio	23,24%	24,83%
3	kiam	16,01%	8,23%
4	kiel	12,60%	13,94%
5	kie	9,40%	7,57%
6	kial	4,24%	4,25%
7	kia	3,93%	1,86%
8	kiom	2,58%	3,85%
9	kies	0,10%	0,13%

El la frekvenc-tabelo rezultas, ke ekz. "kies" estas sufiĉe malmulte uzata kaj oni ne devas dediĉi al ĉi tiu demanda pronomo multe da atento. Aliflanke, kiel praktike montras la ekzemploj cititaj en ĉi tiu ekzercaro, la pronomo "kies" estas tre utila kaj certe oni povus uzi ĝin pli vaste, precipe en diversaj kombinaĵoj kun prepozicioj (ekz. **per kies, kun kies, laŭ kies, pri kies, en kies, ktp.**).

Dialogoj kun k-temandoj

1. A: Ĉu estas la domo? (Ĉu estas la domo?)
 B: Ĉu estas la domo? (Ĉu estas la domo?)
2. A: Ĉu estas la domo? (Ĉu estas la domo?)
 B: Ĉu estas la domo? (Ĉu estas la domo?)
3. A: Ĉu estas la domo? (Ĉu estas la domo?)
 B: Ĉu estas la domo? (Ĉu estas la domo?)
4. A: Ĉu estas la domo? (Ĉu estas la domo?)
 B: Ĉu estas la domo? (Ĉu estas la domo?)
5. A: Ĉu estas la domo? (Ĉu estas la domo?)
 B: Ĉu estas la domo? (Ĉu estas la domo?)
6. A: Ĉu estas la domo? (Ĉu estas la domo?)
 B: Ĉu estas la domo? (Ĉu estas la domo?)
7. A: Ĉu estas la domo? (Ĉu estas la domo?)
 B: Ĉu estas la domo? (Ĉu estas la domo?)
8. A: Ĉu estas la domo? (Ĉu estas la domo?)
 B: Ĉu estas la domo? (Ĉu estas la domo?)
9. A: Ĉu estas la domo? (Ĉu estas la domo?)
 B: Ĉu estas la domo? (Ĉu estas la domo?)
10. A: Ĉu estas la domo? (Ĉu estas la domo?)
 B: Ĉu estas la domo? (Ĉu estas la domo?)

Dialogoj kun K-demandoj

Kiu?

- 1 A: Kiu li/ŝi estas?
B: Li/ŝi estas **Georgo Mopedo**.
Barbara Mopedo
- 2 A: Kiu estas tiu **viro**?
virino
alta junulo
stranga junulino
B: Li/ŝi estas **Georgo Mopedo**.
- 3 A: Kiu **staras** tie?
kuras
iras
promenas
parolas
atendas, ktp.
B: Ĉu vi ne rekonis?
Tio estas **Georgo Mopedo**.
Kristina Tulipo
- 4 A: Kiu **staras** tie **apud la muro**?
sidas antaŭ la domo
malantaŭ la barilo
en la fino de la koridoro
inter la informtabulo kaj la domo
B: Mi pensas ke tio estas **sinjoro Roberto**.
sinjorino Maria
fraŭlino Eva
- 5 A: Kiu **troviĝas** en la **domo**?
sidas kafeterio
B: Mi ne estas certa, sed ŝajnas al mi, ke **Barbara**.
Karlo

- 6 A: Kiu eniras la **domon**?
restoracion
kafejon
B: **Samideano Tulipo.**
Samideanino Tulipo
- 7 A: Kiu eliras el la **domo**?
restoracio
B: **Karlo.**
Irena
- 8 A: Kiun vi vidas tie **en la ĝardeno**?
parko
apud la gazetkiosko
informejo
B: **Karlon.**
Sinjoron Karlo
sinjorinon Maria
Marian
- 9 A: Kiun vi **atendas**?
atendas via edzo
atendas via edzino
B: Mi atendas **Henrikon.**
Barbaran
Li/ŝi atendas sinjoron Pak.
- 10 A: Kiu vizitis vin **hieraŭ vespere**?
hieraŭ nokte
lastnokte
lundon posttagmeze
(=lunde posttagmeze)
sabaton matene
(=sabate matene)
B: **Fraŭlino Lerta Ĉuĉu.**
Doktoro Miozoto
Pipi Ŝtrumpolonga

- 11 A Kiun vi vizitis **lastsemajne?**
lastsabate
lastsemajfine (= la lastan semajfinon)
- B: Mian **amikon Roberto.**
amikinon Maria
Roberton.
Marian.
- 12 A: Kiun el ĉi tiuj **albumoj** vi volas aĉeti?
libroj
ludiloj
- B: Ĉi tiun **dekstre.**
maldekstre
meze de la vitrino (= montrofenestro)
apud la vando¹

Kio?

- 13 A Kio troviĝas **tie?**
tie en la angulo de la ĉambro
tie ĉe la tablorando²
tie sur via robo (pantalono)
- B: Mi supozas, ke tio estas **panero.**
makulo
fadeno (papereto)
- 14 A: Kio vi estas laŭprofesie?
B: Mi estas **oficisto.**
bankoficisto
- 15 A Kio **doloras** vin?
suferigas³
- B: La **koro.**
stomako
dekstra (maldekstra) brako

1 Maldika mureto interna; rilate al mebloj oni uzas "septo" ekz. septo de ŝranko.

2 Rando de tablo.

3 Kaŭzas suferon, sufer-ig-as.

- 16 A: Kio **ĉagrenas** vin?
kolerigas
B: Manko de respondo flanke de mia **amiko**.
leteramiko
(b: **Malĝentila** konduto de mia **najbaro**.)
Malagrabra ĉefo

- 17 A: Kio **afliktas** vin?
incitas
B: La konduto de mia **filo**.
filino
edzo
edzino
ĉefo
ĉefino

- A: En kio konsitas la afero?
B: Li/ŝi tro ofte **nervoziĝas**.
sakras
koleriĝas

- 18 A: Kion vi intencas fari **hodiaŭ vespere**?
morgaŭ nokte
postmorgaŭ nokte
B: Mi intencas **ludi briĝon**.
studi la Esperanto-gramatikon

Kiam?

- 19 A: Kiam vi volas iri al **kinejo**?
operejo
forveturi al **Londono**
Stokholmo
renkontiĝi kun Madonna
B: Postmorgaŭ **nokte**.
vespere, ktp.
Post **du** tagoj. (semajnoj/monatoj/jaroj)
tri, ktp.

20

A: Kiam vi **aĉetos novan videoaparaton?**

lavmaŝinon

fridujon

polvosuĉilon

vendos vian malnovan **domon**

mopedon

motorciklon

B: Verŝajne **ĉi-semajne.**

ĉi-monate

ĉi-jare

21

A: Kiam ni povus **renkontiĝi?**

kune iri al **Roberto**

ripari la fridujon de Eva

B: Eble **hodiaŭ posttagmeze?**

proksimsabate

proksimvendrede

proksimlunde

A: Bone!

22

A: Kiam vi havos **tempon?**

monon

libertempon

ferion¹

B: Kial vi demandas pri tio?

A: Mi volus **forveturi kun vi al Monte Carlo.**

Las Vegas

iri kun vi al **dancejo**

diskoteko

kune kun vi **iom klaĉi**

lerni Esperanton

B: Nu, mi devas pripensi la **aferon.**

proponon

1 Ferio = unu tago libera de laboro aŭ lernado.

Kiel?

- 23 A: Kiel vi sentas vin **hodiaŭ**?
ĉi-somere
ĉi-printempe
B: Dankon pro la demando! Tute bone!
Kaj **vi**?
via **frato**
fratino
A: **Mi ankaŭ sentas min tute bone!**
Li/ŝi ankaŭ sentas sin tute bone!
- 24 A: **Kiel vi nomiĝas?**
Kiel nomiĝas via ĉefo?
B: **Mi nomiĝas Georgo Elefanto.**
Li/ŝi nomiĝas A.B.
- 25 A: Kiel vi planas **aranĝi vian vojaĝon**?
organizi la kunvenon de via E-rondo
B: Tute simple.
Mi telefonos al **la vojaĝoficejo kaj mendos la servojn.**
mia kolego kaj fiksos la detalojn
- 26 A: Kiel mi povus helpi vin en **via laboro**?
la lernado de Esperanto
la riparado de biciklo
la hejmaj taskoj
B: Bonvolu, se eblas, **ordometi¹ la telerojn en la ŝranko.**
vestaĵojn
ordoaranĝi² la ĉambrojn
kuirejon
senpolvigi la plankon
pruntedoni al mi viajn **ŝraŭbŝlosilojn³**

1 Ordometi = meti laŭ difinita ordo.

2 Ordoaranĝi = fari ordon en loĝejo.

3 Ŝraŭbŝlosilo = speciala mekanikista ŝlosilo, kiun oni uzas por ŝraŭbi kaj malŝraŭbi.

Kie?

27 A: Kie ni povus **trankvile preparoli niajn aferojn?**
pribabili nian kunlaboron
renkontiĝi

B: Eble en **la kafejo LOLITA?**
mia hejmo
via hejmo
via laborejo

A: Bone, sed kiam?

B: Mi proponas hodiaŭ **je la 18-a horo.**

A: Konsentite!

28 A: Kie vi planas **libertempi?**
pasigi la semajnfinojn
promeni

B: En **Monte Carlo.**
parko

Kien?

29 A: Kien vi **iras?**
kuras
veturas
rapidas

B: Al la **stacidomo.**
apoteko
vardomo
polikliniko

30 A: Kie vi loĝas?

B: En **Krakovo.**
Varsovio

A: Kaj kien vi veturas nun?

B: Ĝuste al **Krakovo.**
Varsovio

- 31 A: Kien vi volas forveturi por via **feriado?**
libertempado
kuracado
- B: Al **Parizo.**
Tallino
Rigo

Kial?

- 32 A: Kial vi ne **telefonis al mi hieraŭ vespere?**
antaŭhieraŭ matene
venis al mi lastsabate
vizitis min semajnfine
- B: Tial, ke mi devis **fini mian laboron.**
helpi mian **filon**
filinon
varti mian **filineton**
nepon
konsoli mian **najbaron**
nevon
- 33 A: Kial vi tiom ofte **tusas?**
nervoziĝas
- B: Verdire mi ne scias,
sed verŝajne mi devus konsulti mian **psikoanaliziston.**
psikologon
neŭrologon
- A: Mi pensas, ke vi devus malpli multe **labori.**
studi
flirti
- 34 A: Kial nur hodiaŭ vi diras al mi, ke vi ne havas **tempon.**
monon
- B: Ĉar mi ne supozis, ke vi volas **renkontiĝi kun mi.**
forveturi kun mi eksterlanden

Kiom?

35 A: Ĉu vi scias, kiom estas **du** oble **du**?
tri kvar
dek dividite per **du**
ok kvar
du plus **kvin**
sep ses
naŭ minus **kvar**
dek du, tri

B: Jes, mi scias.

A: Do, kiom? Diru!

B: **Kvar.** ktp.

36 A: Kiom da mono vi povus pruntedoni al mi?

B: Por kiom da tempo?

A: Ni diru, por **kvar semajnoj.**

du monatoj

sep jaroj

du horoj

tri tagoj

B: Nu, maksimume **20 kronojn.**

25 dolarojn

A: Bone, dankon!

Kia?

37 A: Kia estas via **najbaro?**

najbarino

fianĉo

fianĉino

B: Li/ŝi estas tre **sentimentala.**

helpema

komplezema

ŝparema

ordema

38 A: Kian koloron havas via **aŭtomobilo**?

robo
jupo
jako
kravato

B: Ĝi havas **bluan** koloron.

verdan
ruĝan
blankan
nigran
flavan
brunan, ktp.

39 A: Kiukoloran¹ **kravaton** vi aĉetis?

mantelon

B: La **bluan**.

grizan

Kies?

40 A: Kies estas ĉi tiu **valizo**?

videobendo²

libro

sonkaseto

B: Ĝi apartenas al **Barbara**.

samideano Mopedo

41 A: Kies **amiko** povus helpi min en la **riparado**?

amikino

ordofarado

konato

kuirado

konatino

lavado

B: Mi pensas, ke tiu de **Kristina**.

Henriko

1 Oni demandas "kiukolora/n", kiam temas pri elapartigo de unu koloro el la jam viditaj pli frue aŭ el la ekzistantaj koloroj. En aliaj kazoj oni uzas "kia/n".

2 Oni ankaŭ uzas "vidbendo" (por "vidmagnetofono" aŭ "videoaparato").

Volitivaj¹ demandoj

- 42 A: Kiu - krom mi - **vizitu Karlon?**
telefonu al Irena
venu al vi hodiaŭ vespere
B: **Stefano kaj Henriko.**
- 43 A: Kiun ni vizitu **morgaŭ posttagmeze?**
semajnfine
B: **Sinjoron Ajn².**
Unuavice samideanon Kluk.
- 44 A: Kio, laŭ via opinio, konsistigu la premion pro
la bona lernado de Esperanto?
la honesta profesia laboro
la efika laboro
B: Mi pensas, ke plej taŭga estus **bela monsumo.**
libropremio
diplomo
- 45 A: Kion mi aĉetu por vi en **Parizo?**
la vardomo
nia butiko
la vendocentrejo³
B: Se vi ne forgesos, aĉetu por mi **Esperanto-vortaron.**
belan kravaton
- 46 A: Kion mi diru al **Stefano** pri via **plano**
sugesto
de nia komuna **vojaĝo al Novjorko?**
Romo
vizito en la Etnografia Muzeo
B: Diru al li/ŝi, ke li/ŝi devus serioze **pitrakti ĉi tiun planon.**
prikonsideri sugeston

1 U-modaj demandoj.

2 Sinjoro Ajn = Sinjoro "X" aŭ Sinjoro "NN".

3 Vendocentrejo = butikarejo = subtegmenta grandega vardomego, en kiu troviĝas multaj butikoj kunligitaj per koridoroj.

- 47 A: Kia estu la **pantalono**, kiun mi aĉetu por vi?
via filo
B: Kompreneble ĝi estu **moda** kaj laŭeble **griza**.
loza bruna ktp.
- 48 A: Kian **konsilon** mi donu al vi koncerne vian **problemon**?
rekomendon malfacila ĵon
sugeston
B: Mi ne scias,
sed vi ekzemple povus **konsili**, ke mi hodiaŭ **edziĝu**.
rekomendi edziniĝu
sugesti iom ripozu
ne pensu pri ĝi
A: Povas esti, ke tio estas la plej **bona** solvo.
ĝusta
- 49 A: Kiam mi **vizitu vin**?
telefonu al vi
redonu al vi la prunteprenitan monon
B: Laŭeble **nunsemajne**.
nunmonate
nunjare
- 50 A: Kiel mi **aranĝu la aferon**?
trovu solvon de nia problemo
B: Demandu **sinjoron Ajn**.
sinjorinon Ajn
- 51 A: Kie ni **renkontiĝu**?
priparolu nian aferon
B: Eble en **mia hejmo**.
via hejmo
kafejo
A: Bone.

52 A: Kiom da mono mi **pruntedonu al vi?**
sendu al vi per telegrame
donacu al vi

B: **100 dolarojn.**
300 markojn
kronojn
rublojn
zlotojn
forintojn
ekuojn

53 A: Kial mi skribu leteron al **Magdalena?**
Aleksandro

B: Ĉar per tio vi **ĝojigos** lin/ŝin.
plezurigos
agrable surprizos

54 A: Kies **konsilon** mi prenu en konsideron?
sugeston

B: Eble tiun de **sinjoro Mopedo.**

Dialogoj kun korelativ-prepoziciaj demandoj

De kiu?

- 55 A: De kiu vi scias, ke mi **aĉetis novan magnetofonon?**
vendis mian vilaon
B: De **Karlo**.
(b: Mi scias tion de **Karlo**.)
- 56 A: De kiu vi ricevis ĉi tiun **donacon?**
albumon
B: De mia **amiko**.
kuzo
onklo
onklino
avo
avino
instruisto
- 57 A: De kiu vi prunteprenis ĉi tiun **biciklon?**
florbukedon¹
belan pupon
B: De **sinjoro Ajn**.
- 58 A: De kiu **lando** vi venis?
urbo
B: De **Hungario**.
Krakovo
- 59 A: De kiu persono vi scias, ke **Karlo** vendis sian **domon?**
butikon
B: De **sinjoro Ajn el Britujo**.

¹ Kelkfoje en la dialogoj aperas strangaĵoj, sed oni faras ĉi tion intence por enkonduki lom da bon-humoro.

- 60 A: De kiu el niaj
klubanoj vi eksciis, ke **Stefano** komencis **lerni Esperanton**?
konatoj Roberto studi en universitato
samurbanoj Kristina
- B: De **doktoro Kulo**.
magistro Miozoto

- 61 A: De kiu monato vi komencis la **lernadon de Esperanto**?
kromlaboron en la fabriko
loĝadon en Oslo
- B: De **marto**.
junio, ktp.

De kio?

- 62 A: De kio vi volas komenci **vian viziton en nia urbo**?
vian rakontadon pri la kongreso
nian interparolon
- B: De la **interparolo kun la urbestro**.
lernejestro
renkontiĝo kun la prezidanto de la E-klubo
vizito ĉe **dentkuracisto**
frizisto
vespermanĝo ktp.

- 63 A: De kio dependas via **vojaĝo al Stokholmo**?
vizito en Monte Carlo
renkontiĝo kun Adalberto
- B: Unuavice de tio,
ĉu mi **havos monon**.
tempon, (paciencon, kuraĝon)
ricevos **libertempon**
permeson de mia edzino
rabatitan bileton
rapide ricevos **vizon**
novan pasporton
konfirmon pri mia hotel-mendo

- 64 A: De kio vi dependigis **vian vojaĝon al Londono?**
vian forveturon al Madrido
la aĉeton de nova aŭtomobilo
la vendon de via kolor-televidilo
- B: Ĉefe de tio, kiam mi ricevos la **mon-prunton de la banko.**
libertempon
ĉu mi ricevos la konsenton de mia **amikino**
ĉefo/estro
- 65 A: Ĉu vi povas diri al mi, de kio venas la **konkludo,**
supozo
konvinko
impreso
- ke **Roberto** volas **edziĝi al Irena?**
Maria edziniĝi al Mateo
Petra divorci¹ disde sia **edzo** (edzino)
Hanna separiĝi disde sia **edzo** (edzino)
- B: Nu, eble de tio, ke de kelka tempo **ili loĝas aparte.**
li flirtas kun Eva
ŝi flirtas kun Karlo
- 66 A: De kio sekvas via **malemo lerni Esperanton?**
flirti kun Magdalena
televidi²
kartludi
suspektemo pri la malbonaj intencoj de Eva
rilate vin
malŝato de **Stefano**
(Henriko, Maria)
malfidemo al Karlo
- B: De tio, ke mi **ne ŝatas lerni fremdajn lingvojn.**
tro multe streĉi mian menson
kartludi
lian/ŝian konduton
preferas **legi librojn**
ludi tenison

1 Divorco = rompo de edzeco/edzineco; divorci = maledziĝi, maledziniĝi.
2 Televidi = rigardi televidon, ekz. televidi interesan filmon, futbalmatĉon.

De kie?

- 70 A: De kie vi scias, ke mi ne **intencas iri al teatro?**
volas kinejo
viziti muzeon
rigardi televidon, ktp.
- B: De viaj **gepatroj.**
geonkloj
geavoj, ktp.
- 71 A: De kie vi havas ĉi tiun **libron?**
belan **jupon**
robon
ĉapelon
- B: Mi aĉetis ĝin **pasintsemajne en Novjorko.**
pasintmonate Barcelono
pasintjare Helsinki
Tampereo
- 72 A: De kie vi eksciis, ke **Magdalena ankoraŭ ne tagmanĝis?**
Roberto matenmanĝis
Aleksandro vespermanĝis
Helena lunĉis
- B: De **Eva.** (Roberto)
- 73 A: De kie vi venis?
B: De¹ **Budapeŝto.** (Berlino ktp.)
- 74 A: De kie² devenas via **familio?**
edzo (edzino)
- B: De la **okcidenta Pollando.**
norda Svedujo
suda Norvegujo
orienta
nord-orienta
nord-okcidenta, (sud-okcidenta ktp.)

1 En la respondo pli ofte oni uzas "el", ekz. el Budapeŝto, el Berlino, el Rovaniemi.

2 Oni povus demandi eble eĉ pli precize "de kiu loko", "de kiu regiono", eventuale: "el kiu regiono".

En kiu?

- 78 A: En kiu **lando** loĝas via **frato**?
urbo onklo
onklino, ktp.
libertempas nun via **amiko**
studas
- B: En **Oslo**.
Las Palmas
Sur la insulo Rodos.
Kanariaj Insuloj
- 79 A: En kiu monato vi intencas **libertempi**?
forveturi al Palermo
aĉeti alian videoaparaton
- B: En **majo**.
januaro
marto, (julio, aŭgusto ktp.)
En majo venontjare.
(aŭ: Venontjare en majo.)
- 80 A: En kiu **ĉambro** vi loĝas?
etaĝo¹ vi loĝas
etaĝo troviĝas via loĝejo
- B: En la **ĉambro numero 33**.
dua etaĝo
kvina etaĝo
teretaĝo

En kio?

- 81 A: En kio troviĝas la **vitamino E**?
vitamino A
- B: En la **semoj de sunfloro**.
En la... ..

1 Oni ankaŭ uzas: "En kioma etaĝo ...?", "Sur kioma etaĝo ..?"

- 82 A: En kio konsistas via **ĉagreno?**
 problemo
 klopodo
- B: Mi ne kapablas **korekte uzi la akuzativon.**
 konduki automobilon (= ŝofori)
 ripari mian biciklon
 Mi ne scias, kiel **ripari mian skribmaŝinon.**

En kia?

- 83 A: En kia **kostumo** vi plej bone sentas vin?
 mantelo
 robo
 pantalono
- B: En **sufiĉe loza.**
 iom loza
 ne tro **longa**
 larĝa
 strikta (= malvasta)

Atenton!

Oni povas krei multe da demandoj, kiuj komenciĝas per "En kia... ? " aŭ "En kiaj..." ekz. "En kia loĝejo vi volus loĝi?"

- 84 A: En kia stato troviĝas via **pantalono?**
 robo
 E-vortaro
 har-sekigilo (= feno)
- B: En tute **bona stato.**
 kontentiga stato
 En terura stato, ĝi estas **multloke tute frakasita.**
 kelkloke plene **detruita**
 rompita
 makulita
 ĉifita
 disŝirita, ktp.

En kiom da... ?

85 A: En kiom da **landoj troviĝas Esperanto-kluboj?**
Esperanto-organizaĵoj
urboj vi jam estis
lokoj

B: En proksimume **10**.
25

En ĉirkaŭ **100**.

Laŭ mia orientiĝo en pli-malpli **120**.

Se mi bone memoras, en pli-malpli (ĉirkaŭ) **50**.

86 A: En kiom da **tagoj** vi volas **fini vian laboron?**
monatoj taskon
semajnoj ekzercon
jaroj ellerni **Esperanton**
horoj la anglan lingvon
minutoj
sekundoj
tempo

B: Mi pensas, ke **en 10 minutoj**.

5 monatoj

en pli ol **30** jaroj

malpli ol **6** horoj

en ĉirkaŭ **10** minutoj

sufiĉos **15** minutoj (= kvaronhoru)

En kies?

87 A: En kies **intereso** vi **donis monon al sinjoro Ajn?**
vizitis sinjorinon Ajn
nomo skribis leteron al Karlo

B: En la nomo de **samideano Bambuo**.
samideanino Lula

Laŭ la **komisio** de **Roberto**.

peto

Eva

Al kiu?

- 88 A: Al kiu vi volas **donaci ĉi tiun libron?**
belan ĵinsan robon
novan ĵinsan pantalonon
proponi komunan vojaĝon al **Karlskoga**
Rimini
rakonti pri via plano **viziti Bergenon**
aĉeti oran ringon
- B: Al **Aleksandro.**
- 89 A: Al kiu **Roberto** pruntedonis sian **globkrajonon?**
Helena skribmaŝinon¹
konfesis sian **amon**
intencon, (planon)
deziron, (revon)
- B: Al sia **nova amiko.**
nova amikino
plej intima (proksima) kolego (kolegino)
- 90 A: Al kiu vi aĉetis ĉi tiun **ludilon?**
fingroringon
arĝentan fingroringon
oran cigaredujon
lignan fruktujon²
plastan florzidon
- B: Al mia **kuzo.** (kuzino, nevo, nevino)
- 91 A: Al kiu vi volas **telefoni post la kurso?**
matenmanĝo
rakonti fabelon pri **drako-esperantisto**
cindrulino
helpi en la **hakado de ligno**
ordigado de libroj
- B: Al mia **najbaro.**
najbarino, (ĉefo, eta kuzo, eta kuzino ktp.)

1 Skribmaŝino = tajpilo (tajpi = skribi per skribmaŝino).

2 Fruktujo = ujo por fruktoj.

Al kia?

97 A: Al kia **homo** povas aparteni **tia pantalono?**
persono tia mantelo
tia aĉa **ĉemizo** (jako)
tia ĉifita **jupo**
tiaj aĉaj **gantoj**
ŝuoj

B: Tutcerte ne al mi, nek al mia **edzino!** (edzo)
Verŝajne al iu **tute stranga.**

freneza
iom **kurioza**
kaprica
tre **eleganta**
ŝika
tro **malŝparema** pri mono
ŝparema
sufiĉe nerespondeca

Al kiom da... ?

98 A: Al kiom da **personoj** vi **donacis vian novan romanon?**
geamikoj rakonton
gekonatoj sendis invit-leteron al via **nupto-festo**
divorco-festo
naskiĝfesto
telefonis por inviti al la **kluba kunveno**
E-kurso

B: Sincere dirite, mi precize ne memoras, sed ŝajnas al mi,
ke al **kvar personoj.**
cent geamikoj, (gekonatoj, ktp.)

Al kies?

99 A: Al kies **invit-letero** vi **respondas** nur nun?
propono reagis

B: Al tiu de **Karlo.** (Monika)

Por kiu?

100 A: Por kiu vi aĉetis ĉi tiun **T-ĉemizon**¹?

bluzon
ŝtrump-pantalonon
piĵamon
noktorobon
negliĝon²

B: Por mia **filo**.

filino
nepo
nepino
edzino

Por kio?

101 A: Por kio³ vi volas viziti **Karlon**?

Barbaran

B: Mi deziras **preparoli kun li/ŝi gravan aferon**.

nian estontan kunlaboron
interkonsenti kun li/ŝi, kiam li/ŝi redonos al mi
la prunteprenitan **dormosakon**
libron
monon
persvadi⁴ lin/ŝin, ke li/ŝi redonu al mi
la prunteprenitan **komputilon**
libron

-
- 1 T-ĉemizo = ĉemizo sur kiu troviĝas reklam-tekstoj aŭ desegnaĵoj, speciale ŝatata de gejunuloj.
 - 2 Negliĝo = oportuna vesto, piej ofte vasta, malstrikta, kiun oni uzas hejme post la ellitiĝo aŭ kelkan tempon antaŭ la enlitiĝo.
 - 3 Oni ankaŭ uzas **kiucele**?
 - 4 Persvadi = per taŭgaj argumentoj instigi lun al iu ago, konvinki ke li/ŝi faru ion.

Por kia?

- 102 A: Por kia¹ **radioricevilo** vi bezonas taŭgan **sakon**?
magnetofono tekono
skribmaŝino ujon
fotilo portujon
- B: Por **tute malgranda**.
sufiĉe malgranda kaj malpeza

Por kiom da... ?

- 103 A: Por kiom da **semajnoj** vi **veturos al Moskvo**?
monatoj Peterburgo
jaroj vojaĝos al **Usono**
tagoj Finnlando
horoj iros al la **parko**
minutoj biblioteko
- B: Por **kvar jaroj**.
dudek minutoj, ktp.
Nur por **kvaronhoro**.
duonhoro²

Por kies?

- 104 A: Por kies **plezuro** vi aĉetis pli modernan **videoaparaton**?
oportuno komputilon
magnetofonon
televizilon

1 Se oni demandas, por kiu (ekz. por kiu radioricevilo vi bezonas taŭgan ujon?) oni komprenigas, ke temas pri unu el la radioriceviloj, kiuj ekz. troviĝas en vendejo aŭ en via loĝejo. Tiam oni montras ĝin (ekz. ĉi tiu dekstrel) aŭ oni mencias la nomon (por "Sangean"!).

2 En la komuna lingvouzo tre ofte oni uzas "-et" por (eble iom ŝerce) substreki la mallongecon de la tempo, ekz. Por kvaronhoreto. Por duonhoreto.

B: Mi aĉetis ĝin por mi mem!

Por mia propra **plezuro**.

oportuno

Por **plezurigi** mian **amikon**.

ĝojigi

amikinon

kontentigi

edzon

surprizi

edzinon

Pri kiu?

105 A: Pri kiu vi **pensas?**

rakontas

zorgas

ĉagreniĝas

B: Pri mia **nevo**.

nevino

nepo, (nepino, ktp.)

106 A: Pri kiu **libro** vi **rakontas?**

filmo pensas

romano

B: Pri la **libro "Esperanto en dialogoj"**.

filmo "Milito kaj paco"

romano "Pipi Ŝtrumpolonga"

libro "La finna vojo", ktp.

Pri kio?

107 A: Pri kio vi nun **pensas?**

cerbumas¹

B: Pri mia **Esperanto-ekzameno**.

nova respondeca tasko

letero al Pola Radio

divorco

1 Cerbumi = penege streĉi siajn pensojn.

Pri kia?

- 108 A: Pri kia **najbaro** vi revas?
najbarino
edzo (edzino)
ĉefo (ĉefino)
- B: Li/ŝi devus esti **komplezema**.
helpema
ŝparema
muzikama¹
gastama
bestama

Pri kiom da... ?

- 109 A: Pri kiom da **filmoj** vi povus rakonti tuj?
libroj
teatraĵoj
- B: Pri **du-tri**.
kvar-kvin, ktp.
Verŝajne pri neniu.

Pri kies?

- 110 A: Ho, **malbone** mi forgesis kunpreni mian **vortaron**.
terure horaron
mi lasis **hejme** mian **adresaron**
ekstere ombrelon
- B: Pri kies **vortaro** vi forgesis?
horaro
(b: Kies **adresaron** vi lasis **hejme**?)
- A: Pri la mia!
(a: La mian!)

1 Post la verbaj radikoj oni uzas la sufikson **-em**, ekz. helpi - **helpema**, ŝpari - **ŝparema**. Post la substantivaj radikoj oni kutimas uzi sufikse la radikon **-am**, ekz. gasti - **gastama**.

Kun kiu?

- 111 A: Kun kiu vi volas **promeni hodiaŭ vespere?**
disputi morgaŭ nokte
libertempi ĉi-jare
esperantumi¹ ĉi-somere
enui
oscedi, (sakri, fasti)
- B: Kun mia **ĉefo**.
ĉefino
amiko
amikino
korespondanto, (leteramiko, leteramikino, ktp.)

Kun kio?

- 112 A: Kun kio vi ligas vian **projekton**, pri kiu vi ĵus² **menciis?**
planon rakontis
intencon
deziron
- B: Kun mia eventuala
partopreno en TEJO-kongreso³.
volontula laboro en la Centra Oficejo de UEA⁴
laboro de vojaĝgvidanto en Esperantotur en Bydgoszcz
renkontiĝo kun Rikardo
lingva staĝo en Miedzygorze⁵

1 Sufiĉe ĝenerala esprimo renkontata en esperantistaj medioj, kiu signifas "praktiki Esperanton, pasigi la tempon okupiĝante pri Esperanto-aferoj".

2 Ĵus = antaŭ momento; la vorto substrekas, ke io antaŭ momento okazis, ekz. mi ĵus diris = antaŭ momento mi diris; ne miksu kun "ĝuste", kiu signifas: sen ia dubo, tute precize, konkrete, ekz. ĝuste antaŭ du horoj mi diris al vi, ke...

Atenton!

En Esperanto ne ekzistas la vorto just, kiun tute erare iuj komencantoj kaj... progresintoj uzas!
Nepre memoru tion!

3 Fakte en la lastaj jaroj oni uzas IJK (Internacia Junulara Kongreso), sed ordinare pli ofta estas la nomo "TEJO-kongreso"; TEJO - Tutmonda Esperantista Junulara Organizo.

4 En la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio de multaj jaroj volontule, (senpage, nur kontraŭ la poŝmono, manĝoj kaj loĝado) laboras kelkmonate junaj homoj, kiuj volas helpi la movadon kaj samtempe pliperfektigi sian lingvokonon, profundigi sian scion pri movadaj kaj organizaj problemoj.

5 En Miedzygorze, ĉarma montara loko en la sud-okcideta Pollando jam de pli ol 20 jaroj okazas esperantistaj libertempadoj (la ripozon oni kombinas kun la lingvostaĝoj, ekskursoj, ktp.).

Kun kia?

- 113 A: Kun kia rapideco **estas permesite** ŝofori **sur ĉi tiu aŭtovojo?**
oni rajtas ĉi tie
B: Ni pensas, ke kun la maksimuma rapideco de **80 kilometroj**
hore¹.

Kun kiom da... ?

- 114 A: Kun kiom da **gesamideanoj** vi **korespondas?**
personoj renkontiĝas
B: Kun proksimume **dudek**.
okdek ktp.
- 115 A: Kun kiom da mono vi **iros butikumi?**
iros al restoracio
forveturos al Las Vegas
B: Verŝajne mi kunprenos **500 dolarojn**.
ĉekon por 5 000 dolaroj
ĉekon por 10 mil kronoj kaj iom da
kontantaĵo²

Kun kies?

- 116 A: Kun kies **infano** vi iris al **cirko?**
ĉefo dancejo, ktp.
B: Kun tiu de **Roberto**.
sinjoro Rikardo, ktp.

1 Neniama uzado "pohore"!

2 Kontantaĵo = la tuta kvanto de la tuj disponebla mono, kiun oni kunhavas (metalaj moneroj kaj monbiletoj).

Kontanta = tuj pagebla; aĉeti kontante, aĉeti per kontanta mono - aĉeti tuj pagante per monpagiloj, ne pere de la banko.

Per kiu?

117 A: Per kiu **aŭtobuso** mi povas atingi la **urbodomon**?
trolebuso sidejon de PEA¹
tramo Nacian Muzeon
subtrajno² stadionon

B: Per la **numero 44**.
la linio 25
la aŭtobuso numero 22
33

118 A: Per kiu trafikilo vi **vojaĝos al Pekino**?
veturos al Tokio

B: Per **aviadilo**.
trajno
aŭtoĉaro
aŭtomobilo
skotero
trotilo

119 A: Per kiu **trinkaĵo**³ mi regalu vin?
manĝaĵo

B: Per kiu **ajn**⁴, ekzemple per **kafo**. (sandviĉo)
teo (kuko)
lakto (pomo)
suko (piro)
akvo (pruno)
ktp.

1 PEA = Pola Esperanto Asocio.

2 Subtrajno = trajno, kiu veturas sub la tero; oni ankaŭ uzas "metroo" (oni akcentas o!); do eventuale oni povas diri "Per la metro-linio numero kvin."

3 Oni povas demandi krome: "Per kiu frukto?" (per kiu el la ekzistantaj) "Per kia frukto?" - ekz. Per dolĉa frukto.

4 Kelkfoje oni povas diri "Per ajna trinkaĵo" aŭ "Per ajna manĝaĵo" Aŭ tute simple: "Per ajnaĵo".

Per kio?

- 120 A: Per kio mi povus **helpi vin?** (komplezi vin)
ĝojigi vin
plezurigi vin
- B: Ĉu vi povus
pruntedoni al mi viajn gantojn?
porcelanajn telerojn
sportajn ŝuojn
vian **mikroondan fornelon**¹
kaf-aparaton²
- aĉeti por mi **du panbulojn?** (tri francajn bulkojn)
duonkilogramon da **butero**
kvaronkilogramon da **ŝinko** (fromaĝo, kazeo)
- aĉeti por mi skatolon da **krakpano**³
ŝmirfromaĝo
- A: Jes, kompreneble. (Jes, volonte.)

Per kia?

- 121 A: Per kia **trinkaĵo** vi volus esti regalita?
manĝaĵo
suko
lakto
- B: Per **varma trinkaĵo**. Ekzemple per **kafo kun kremo**.
malvarma minerala akvo
senalkohola oranĝ-suko
vegetara⁴ manĝaĵo piza supo
ne tro grasa kolbaso el sojo
facile digestebla sengrasa lakto
buterpano kun tomato

1 Ujo por rapida varmigado de manĝaĵoj, trinkaĵoj.

2 La nomo ankoraŭ ne stabiligis, ofte oni uzas la nomon kaf-infuzilo, ĉar la kafon "oni infuzas" versante boligitan akvon sur pulvorigitan kafon.

3 Krak-pano = ĉar ĝi krakas sub la premo de la dentoj sed kelkfoje oni simple diras "seka pano" aŭ en komuna lingvouzo "sek-pano" (same kiel "sekinbero").

4 Oni prefere uzu la nomon "vegetara manĝaĵo", "vegetara trinkaĵo" ktp. kvankam certasence logika estas ankaŭ la nomo "vegetarana manĝaĵo, trinkaĵo" ĉar konsumas ĝin vegetarano konforme al difinitaj dietaj konsiloj.

Per kiom da... ?

- 122 A: Per kiom da mono vi povus helpi min **hodiaŭ**?
ĝis morgaŭ
ĝis lundo
ĝis la fino de la monato
- B: Ekzemple per **2 000 frankoj**.
200 rubloj
Nur per **400 markoj**.
Maksimume per **800 levoj**.
Bedaŭrinde per neniom da mono, ĉar mi ne kunhavas monon.

Per kies?

- 123 A: Per kies **mono** vi volus **realigi vian ekskurson al Oslo**?
monprunto
vojaĝon al Usono
monhelpo
havigi al vi **novan loĝejon**
aŭtomobilon
somer-dometon¹
- B: Per la **mono** de mia **bopatro**.
bopatrino
monhelpo de miaj **bogepatroj**²
boge-fratoj
boge-filoj
boparencoj
monprunto de mia **banko**
nova amikino

El kiu?

- 124 A: El kiu **lando** vi venis?
loko, (urbo, vilaĝo)
- B: El **Svedujo**.
la urbo Lundo
la urbo Salo

1 Siatempo oni proponis la rusdevenan vorton "daĉo" (somera dometo, somera restadejo), kiun transprenis ankaŭ kelkaj naciaj lingvoj, sed ŝajnas, ke la simpla "somer-dometo" estas uzata pli ofte.

2 Kiam necesas uzi "bo-" kaj "ge-" kune en unu vorto, "bo-" ĉiam troviĝas antaŭ "-ge".

El kio?

125

A: El kio **sekvas** via **opinio**,
rezultas supozo
konkludo
konjekto

ke **gesinjoroj Ajn** volas **mendi novajn meblojn?**
Aleksandro seĝojn
Helena dungigi novan **servistinon**
MONDA TURISMO¹ sekretariinon
Oy **MENDOSERVO Ak**² **maldungi sian pedelon**
eksigi tajpistinon
vendi parcelon
aĉeti modernan fridigujon

ke Barbara kaj Remiĝo volas **divorci.**

gefianĉiĝi
geedziĝi

B: Lastatempe ili, tre ofte, **kverelas** unu kun la alia³.

disputas

neglektas unu la alian

kritikas

batas

draste ŝparas monon.

kolektas turismajn gvidlibrojn kaj
mapojn

1 La esperantista organizaĵo **MONDA TURISMO** estas leĝe registrita en Pollando; ĝia ĉefa sidejo troviĝas en Bydgoszcz, la plej granda centro de Esperanto-turismo.

2 Oy **MENDOSERVO Ak**, en Finnlando aperigas Esperanto-librojn (beletron kaj lernolibrojn) kaj videobendojn kun Esperanto-kanzonoj, i. a. ĝi eldonis dialogforman romaneton por komencantoj "Ĉu vi parolas Esperante?" de A. Pettyn kune kun du sonkasetoj C-60, sur kiuj estas registrita la tuta romaneto per la voĉoj de konataj polaj parolisto kaj aktoroj.

3 La **reciprokeco** en Esperanto estas esprimata per tri rimedoj:

* per la menciita en la dialogo esprimo "unu la alia/n" ekz. Ni amas unu la alian. Aŭ per la sama esprimo kun la aldono de koncerna prepozicio, ekz. Ili iris unu post la alia. La vorto "unu" povas laŭbezone alpreni la pluralan finaĵon -j, do - unuj. Ekz. Ili ne povas kunesti unuj kun la aliaj. Ĝi ankaŭ povas aperi en akuzativa formo, ekz. "La militoj kontraŭ-starigas homojn unujn kontraŭ la aliajn".

* per la adverbo "reciproke", ekz. Ili amas sin reciproke. Ni bone komprenas nin reciproke.

* per la esprimo "inter si", ekz. Ili estis inter si longan tempon.

Fine estas aldoninde, ke en kelkaj situacioj la reciprokecon povas montri la prefiksa uzo de inter-, ekz. Ili interhelpis sin. Ni-interamas nin jam delonge.

Kun la verboj "kisi, bati, respondi, rigardi, renkonti" oni eĉ kutimas forlasi la refleksivon, ekz. "La geknaboj interkisas." "Iliaj gefiloj interbatis."

El kia?

126 A: El kia **regiono** devenas viaj **gepatroj**?
loko geavoj
geonkloj
bogefratoj

B: El **sufiçe granda urbo**.
vilaĝo
tute malgranda **vilaĝeto** en la **suda Pollando**.
urbeto norda Svedujo
la regiono **Pomeranio** orienta Finnlando
Silezio okcidenta Germanujo

A: Kiel ĝi nomiĝas? Ĉu vi eble memoras?

B: Jes. Ĝi nomiĝas **Piispanristi**.
Karlskoga

El kiom da... ?

127 A: El kiom da **personoj** konsistas via **familio**?
membroj laborgrupo
komisiono

B: El **tri personoj**.
kvin membroj, ktp.

El kies?

128 A: El kies **bankkonto** devenas la mono, kiun vi ricevis?
fondaĵo

B: Ĝi devenas el la **konto de sinjoro Ajn**.
la fondaĵo **Bjalistoka Centro**¹

1 Centro konstruota en la naskiĝurbo de Zamenhof.

B: Laŭ lia/ŝia nuna vivmaniero.

vivstilo

stranga konduto

neintencita eldiro

hazarda konfeso al Barbara

vizaĝesprimo

grimaco

pasintsemajna eldiro al Karlo

Laŭ kia/j/?

131 A: Laŭ kia(j) **trajto(j)**¹ vi **prijuĝas** viajn **gekonatojn**?

ecoj

pritaksas

geamikojn

kunlaborantojn

B: Laŭ tio, ĉu li/ŝi/ili estas sufiĉe **honestaj(j)**.

sincera(j)

akurata(j)

helpema(j)

komplezema(j)

laborema(j)

b: Laŭ tio, ĉu li/ŝi/ili ne estas tro **ekstravaganca(j)**.

kaprica(j)

aroganta(j)

Laŭ kiom da... ?

132 A: Laŭ kiom da **ekzercolibroj** vi **lernis Esperanton**?

lernolibroj

pian-ludon

libroj

studis kuirarton

B: Laŭ **du-tri lernolibroj**.

Laŭ mia memoro laŭ **tri-kvar libroj**.

Mi precize ne memoras, sed ŝajnas al mi, ke laŭ proksimume **ok-dek libroj**.

1 Trajto = ne nur linio de vizaĝo, sed ankaŭ: ago rimarkinda kaj sekvinda kiel ekzemplo.

Post kia?

135

A: Post kia¹ **trinkaĵo** komenciĝis ĉe vi la **stomakdoloro?**
manĝaĵo

kapdoloro
hepatdoloro
liendoloro
rendoloro
kordoloro
korpremo
korpikado
gorĝodoloro

B: Post **malvarma trinkaĵo**. (manĝaĵo)
tro **spicita** manĝaĵo
salita
piprita
malfreŝa

La supran dialogon oni povus daŭrigi ekz. jene:

A: Sed ĉu vi memoras, kiun konkrete **trinkaĵon** vi **trinkis?**
manĝaĵon manĝis

B: Mi **trinkis acidan lakton**.
bieron

manĝis **funĝan supon**

kukuman supon

sangokolbason

glaciaĵon kun **mirteloj**

nigraj riboj

ruĝaj riboj

ananaso

banano

ĝarden**fragoj**

ĉerizoj

grosoj

¹ "Kia" demandas pri kvalito; se oni dezirus tuj demandi pri konkreta nomo de konkreta trinkaĵo, oni devus uzi "kiu?", ekz. "Post kiu trinkaĵo? Post Coca cola."

Post kio?

136

A: Post¹ kio troviĝas la **biciklo**?
magnetofono
sonkaseto
infano

B: Post la **pordo**.
pordego
arbo
muro ktp.

Post kiom da... ?

137

A: Post kiom da **minutoj** vi **telefonos al mi**?
horoj venos al mia hejmo
tagoj vizitos min
semajnoj riparos mian **polvosuĉilon**
monatoj kvarcan vekhorloĝon

B: Post **10 minutoj**.
2 horoj
3 kvaronhoroj
Post proksimume (ĉirkaŭ) **3-4 tagoj**.
4-5 jaroj
Ne pli frue ol post **2-3 monatoj**.
Plej malfrue post **20-30 minutoj**.

1 Por eviti konfuzon kun la tempa signifo de "post", en la loka signifo oni kutimas uzi "malantaŭ", do ekz. "malantaŭ la pordo". Teorie "post kio?" en loka senco estas uzebla, sed praktike oni preferas "malantaŭ"!

Post kies?

- 138 A: Post kies **admono** vi decidis
insisto
provizi la pordon de via loĝejo per kroma seruro?
sekuriga pordoĉeno
tegi la **seĝojn** per nova ŝtofo
kanapon
konfidi la ŝparitan monon al via **onklo**
plasi¹ vian tutan monon en **kooperativa banko**
ŝtata banko
urba banko
ŝparbanko
ŝparkaso
asekuri **vin**
vian vivon
vian domon kontraŭ ŝtelo
vin kontraŭ malsano
konsoli vian **najbaron**
najbarinon
- B: Post la **admono** de mia **patro**.
insisto frato
Mi ne plu memoras!

Sur kiu?

- 139 A: Sur kiu placo troviĝas la **Monumento de Libereco?**
monumento de Zamenhof
statuo de Afrodito
busto de Voltero
- B: Sur la **Placo de Herooj**.
Placo de Invalidoj
Placo de la Venko
Kastela Placo

1 Plasi = ŝparloki.

Sur kio?

- 140 A: Sur kio baziĝas via **suspekto**, ke **Karlo**
supozo Irena
trompas sian fraton
fratinon
kokras¹ sian **edzon**
edzinon
primensogas sian **direktoron**
delogas sian **profesoron**
- B: Sur tio, ke li/ŝi
pasigas siajn semajnfinojn kun Kristoforo.
ĉiun posttagmezon kun **Margareta**
fraŭlino Dorotea
doktoro Miozoto
- kaŝas la alvenantajn **fakturojn**
leterojn
ne diras al li/ŝi la veron pri **siaj enspezoj.**
honorarioj
tantiemoj²
sia **salajro**
monata salajro

Sur kia?

- 141 A: Sur kia **seĝo** vi ŝatas **ripozi?**
benko sidi
plaĝo sunbruniĝi
herbejo pasumi³
- B: Sur ne tro **alta seĝo.**
benko
ne tro **brua plaĝo**
malproksima herbejo
trankvila herbejo

1 Kokri = sekse trompi sian partner(in)on.

2 Tantiemo = procenta monsumo, kiun la eldonisto pagas al aŭtoro pro ĉiu vendita ekzemplero de lia verko (libro ktp.).

3 Pasumi (pas-um-i) = malrapide, sencele promeni farante nenion.

Sur kiom da... ?

- 142 A: Sur kiom da **placoj** en via **urbo** troviĝas **monumentoj**?
plaĝoj ripozloko belaj florbedoj
kuraĉloko pura sablo
- B: Sur **du-tri**.
Nur sur **unu!**
Mi ne scias, povas esti, ke sur **neniu!**

Sur kies?

- 143 A: Sur kies **lernolibro** troviĝas **jaketo**¹?
robo kolora brodaĵo
bluzo sukkena² ornamaĵo
- B: Sur tiu de **Irena**.
Petro ktp.

Antaŭ kiu?

- 144 A: Antaŭ kiu domo **Karlo** kutimas **parki** sian **aŭtomobilon**?
Maria motorciklon
promenigi sian **hundon**
pudelon³
- B: Antaŭ tiu **dekstre**.
maldekstre⁴
Antaŭ la domo **n-ro 44**.

1 Jaketo (jak-et-o) = ne surgluita (kutime papera) ŝirmokovrilo de libro.

2 Sukcena (el sukceso, farita el sukceso); sukceso = flava malmola kaj diafana (travidebla) rezino (solidiĝinta arbosuko), kiun oni uzas por fari ornamaĵojn, kolĉenojn, braceletojn ktp.).

3 Kelkaj aliaj nomoj de rasaj hundoj: vertago (= mel-hundo; kun mallongaj kruroj, iom longa, speciale taŭga por ĉasi bestojn, kiuj sin kaŝas en ter-truoj); pudelo (kun nigraj, krispaj haroj, kiujn oni pritonadas); buldogo (kun larĝa, mallonga kapo, el la raso de dogoj); luphundo; spanielo; krome: korthundo (por gardi la domkorton) kaj mikshundo (tute ordinara nerasa hundo, "miksulo").

4 Memoru, ke ankaŭ en "mal-vortoj" oni akcentas nur (!) la antaŭlastan silabon.

Antaŭ kio?

145 A: Antaŭ kio¹ **Maria haltigis** sian **aŭtomobilon?**

Petro parkis biciklon
starigis infanĉareton

B: Antaŭ la **apoteko.**

vest-lavejo
vendejo de ludiloj
vardomo

Antaŭ kia?

146 A: Antaŭ kia **virino haltis** via **edzo** pro **surpriziĝo?**

viro edzino ŝokiĝo

B: Antaŭ iu **virino terure strange vestita.**

viro tre kurioze vestita
nekutime vestita

Antaŭ kiom da... ?

147 A: Antaŭ kiom da **jaroj** vi lastfoje vizitis **Venecion?**

monatoj friziston
semajnoj kosmetikistinon
teatron
zoologian ĝardenon
botanikan ĝardenon
la urban oranĝerion

B: Se mi bone memoras, antaŭ **du-tri jaroj.**

proksimume **10 tagoj**

Mi tute ne memoras, pardonu!

1 Ĉi tiu demando-modelo teorie ekzistas, sed praktike ĝi ne estas uzata.

Antaŭ kies?

148 A: Antaŭ kies **domo** kreskas **belaj rozujoj**?
vilao bonodoraj jasmenujoj
floranta **ĉerizarbo**¹
